

JARA RAPORTO de ESPERANTO-FRANCE

2011-2012

1. Tutlandaj agadoj

1.1. Komisiono pri Eksteraj Rilatoj

Listo de gazetaraj komunikoj dum la jaro 2012 :

<http://esperanto-france.org/communiqués-de-presse-2012>

9a de junio 2012 - **Ekster-ordinara ekzameno-sesio** okazos samtempe en 29 urboj el 17 landoj :
[elŝuti la dokumenton \(PDF\)](#)

- La 9a de junio ekde la 9a de la mateno, en 29 urboj el 17 landoj, tra la tuta mondo, centoj da kandidatoj prilaboros samtempe por obteni la valoran diplomon de la KER ekzameno. En Francio 125 homoj partoprenos la konkurson ;
- La 26a de julio 2012 – La **125a datreveno de Esperanto** : [elŝuti la dokumenton \(PDF\)](#) ,
- Ĉi jare okazos la 125a datreveno de Esperanto. En 1887, la 26an de julio, la juna Ludoviko Lazare Zamenhof eldoniĝis la unan libron de Esperanto. Ekde de tiu epoko la lingvo disvastiĝis en 120 landoj tra la 5 kontinentoj kaj adaptiĝis al la nuna tempo, kaj al ĝiaj teknikoj.

1.2. MCE Grésillon

UFE, kiel 1 el 10 elektitaj komitatanoj, subtenas la agadojn de Grésillon per informado en siaj eldonaĵoj.

En 2012, Grésillon okazigis printempan intensan kursaron kun KER-ekzamenoj, 4 somerajn semajnojn, unuafoje Aŭtunan feriadon kaj jarfinan feston.

Inter 2011 kaj 2012, la nombro de gastoj, tranoktoj, manĝoj kaj uztagoj de la kulturdoma Esperanto-programo altiĝis je inter 15% kaj 30%.

Krome la kastelon luis Interkant' por ĥorstaĝo, EDE por somera universitato kaj 3 privatuloj por familiaj festoj.

Okazis 14 laborsemajno(fin)oj, 6 komitat- aŭ membrokunvenoj. Ĉio kune okupis la kastelon dum sume 123 tagoj en 2012.

Pro la novaj statutoj, la kastelo estas ekde marto 2013 publike luata. Luoj jam okupas ĝis septembro preskaŭ ĉiun liberan semajnfinojn. Post la konformigaj riparoj de la akvo-forflu-sistemoj, pludaŭras konformigo de fenestraj balustradoj kaj fajrorezistaj pordoj.

Planatas en 2013 aldono de ekstera savŝtuparo anstataŭ ĉambroj 11 kaj 20, por rajti remalfermi duonon de la 2a etaĝo.

Plu intensas la informa laboro per retejo kaj dissendado kaj la **serĉado de novaj kunlaborantoj kaj staĝanoj**.

Vidu staĝan agendon en gresillon.org/agendo. Informiĝu pri laboraj semajnfinoj en gresillon.org/laboro

1.3. Afrika Solidareco

Raporto pri agado Solidareco al Afriko (sendo de lernomaterialo al Afriko)

De oktobro 2011 ĝis oktobro 2012, lernolibroj kaj informiloj pri esperanto (kalendaretoj, langue équitable) estis senditaj al :

Benino:

- Innocent ETEKA (informiloj).
- Latifou GBADAMASSI, en Lokossa por *Infanoj Ĉirkaŭ Afriko* kiu okazigas perkorespondajn kursojn por komencantoj en la angla kaj la franca, ricevis informilojn kaj lernolibrojn.
- la 26-an de julio 2012 la benina landa asocio malfermis sian bibliotekon al la publiko. Pere de Mireille Grosjean tien vojaĝonta en oktobro 2012, ni sendis al L. Gbadamassi librojn kun suma valoro de 172,20 €.

Togolando

- Adje Adjevi, por la unua Kongreso Tutafrika pri Kulturo, ilo por evoluo en Afriko en novembro 2011, plus po 12 x de *Metodo 11* kaj *Metodo 12* (por la Kultura Foiro en Togolando de marto 2013) tra francaj vojaĝantoj el Arieĵo.

Senegalo

- Oumar Ndiaye (Rufisque/ Dakaro) : vortaroj, legaĵoj.

Ruando

- Ruanda Esperanto-Klubo (c/o ADES Association, P.O.Box 2938 Kigali), nov-kreita klubo, lernolibroj kaj vortaretoj.

Burundo

- Hasano NTAHONSIGAYE, el Rumonge, vortaroj kaj 10 *Metodo 12* (por estonta seminario en 2013).
- Gilbert, kiu ĝoje informis pri la kreado de esperanto-klubo en universitato de Ngozi, ricevis lernolibrojn (*Metodo 11*) por siaj 15 lernantoj.

Kongo

- Alexandrine OMBA Tshamena, BP 99 17 Kinshasa 1, por sia klubo ricevis diversajn lernolibrojn kaj legolibrojn elektitajn de Thomas Larger, kiu tiucele donacis la sumon 160 eŭrojn.
- Tiujn sendojn, el suma valoro 488 €, ebligis la donacojn de niaj membroj, dedukteblaj de imposto por tiuj, kiuj pagas imposton.
- Plej multaj estis perpoŝte senditaj je speciala malalta tarifo pro libroj, sed kelkaj estis kunportitaj de vojaĝantoj al Afriko, kio certigas alvenon de la donacoj.

Raportis la 3-a de aprilo 2013 Jeanne-Marie CASH

1.4. Pétition espéranto au bac

Post lanĉo dum la kongreso IREM en aprilo 2011, 2012 estis la dua jaro de la kampanjo. La fazo de kolektado de subskriboj finiĝis fine de oktobro 2012. Kelkaj statistikoj :

Entute 33 841 subskriboj, malpli ol la planitaj 50 000, el kiuj :


- 3 955 kolektitaj rete kaj 29 886 papere
- 7 499 retpoŝtaj adresoj kolektitaj

Pri la kontribuintoj :

- 259 individuaj kontribuintoj (el kiuj 51 "sen-nomaj")
- 58 asociaj kontribuintoj
- 2 homoj kaj 4 asocioj kolektis po pli ol 1000 subskriboj


Neniu papera petskribo ricevita el 24 departementoj

Répartition envois Individus




Vidu la dispartigon en la aneksitaj grafikoj.

Répartition envois Associations



Évolution nombre de signatures



Pri la subskribintoj :

- 49 parlamentanoj : 31 deputitoj, 12 senatanoj, 6 EU-deputitoj
- 186 urbestroj
- 24 famuloj, el kiuj : Guy Béart, Cabu, Charb, Nathalie Dechy, Claude Hagège, Henriette Walter, Eva Joly, Axel Kahn, Alain Lipietz, Gérard Onesta, Michel Onfray.

Aliaj rezultoj de la kampanjo : 13 demandoj estis starigitaj de parlamentanoj al la registaro. Tamen la kampanjo ne tute

finiĝis kun ĝia desubisma fazo. Restas kelkaj (desuprismaj) etapoj plenumendaj :

- Sendado al ĉiuj parlamentanoj de letero raportanta pri la rezultoj de la kampanjo (laŭplane en aprilo 2013).
- Organizado de gazetara konferenco anoncanta la rezultojn al ĵurnalistoj.
- Depono de la kolektitaj subskriboj ĉe la Ministerio kun dosiero pri nia kapablo organizi la ekzamenon.

Eĉ se la petskriba kampanjo ne tute finiĝis, estas ĉi tie bona okazo danki al ĉiuj esperantistoj, kiuj kontribuis al ĝi - grandan dankon al vi ĉiuj !

Apartan gratulon al la iniciatinto kaj la organizinto de la kampanjo, Frédéric Scibor kaj Guy Camy. Kio ajn estos la fina rezulto, ni kustu plu la manikojn kaj daŭrigu la laboron por diskonigi Esperanton. Nun estas tempo ellerni el sukcesoj kaj malsukcesoj de la kampanjo.

1.5. Rilatoj kun SAT-Amikaro

Espéranto-France plenumis plurajn agadojn kun SAT Amikaro dum la periodo :

- Reta komuna datumbazo ;
- Petskribo por enkonduko de Esperanto en la abiturienta ekzameno (pétition « Espéranto au bac ») ;
- Komunaj vesperoj en francilio (koncertoj, babiladoj, Café Espéranto...)

1.6. La kongreso

En 2012, la kongreso okazis en Saint-Aignan-Grand-Lieu. Ĝi estis organizita de la loka grupo de Saint-Aignan, gvidita de Solange Goan. Malgraŭ malfruo en la organizado, ni sukcese havis 100 partoprenantojn kaj bonan etoson. Ni forte dankas la organizantojn kiuj kontribuis havi agrablan kongreson. La kongreso de 2013 estos organizita en Artigues-près-Bordeaux. Dum tiu jaro, ni ankaŭ daŭris la muntadon de la dosiero por akcepti UK-on en 2015 en Lille. Ni renkontis la instancojn de UEA en julio por vizitigi la urbon de Lille kaj la kongresejon.

1.7. Kulturo

Tra la jaro la koruso Interkant' (kiu ricevis subvencion i.a. de UFE) preparas novan spektaklon, adaptita el *Carmen*. Gijom ankaŭ ricevis subvencion por la projekto « miprovi » : <http://www.miprovi.info/>

1.8. Le Monde de l'Espéranto

Aperis tri numeroj (580, 581, 582) dum la koncerna periodo. La numero 581 estas duobla, kun la jara raporto.

Ĝi estas redaktita de Claude Nourmont, la grafikan laboron prizorgas Bruno Flochon. Regule kunlaboras Raymonde Coquisart, ĉefe por la rubriko *vojaĝoj*. Kontrollegas ĝin François Bartsch kaj Brian Moon.

En ĉiu numero aperas speciala dosiero foje en la franca pri grava temo, franclingvaj kaj esperantlingvaj aktualaĵoj, informoj pri la agadoj, kulturaj paĝoj, dulingva paĝo kun traduko de literatura teksto originale verkita en Esperanto, vojaĝaj notoj kaj aliaj rubrikoj.

1.9. Okazas kaj Esperanto Aktiv'

De februaro 2010, UFE kaj JEFO kune dissendis retleteron al ĉiuj membroj kaj personoj kiuj interesiĝas pri Esperanto (ĉefe personoj kiuj aliĝis al la interretaj kursoj de JEFO). Tiu letero, verkita en la franca lingvo, prezentas kulturajn aferojn, kalendaron, agadojn de lokaj asocioj kaj librojn. Ekde decembro 2010, enretigo de nova formulo por la letero Esperanto-Aktiv, kun 4 regulaj rubrikoj : *Découvertes* (Axel Rousseau, Raymonde Coquisart), *Ils l'ont fait dans leur région* (Jeanne-Marie Cash), *Calendrier* (François Bartsch) kaj *Le livre du mois*. Skipo de pluraj personoj ĉirkaŭ Anne-Émilie

Ravache, kiu zorgas pri redaktado, enpaĝigo kaj publikigo de la letero, helpe de Emmanuelle Richard por teknika flanko. Jeanne-Marie Cash enpaĝigas la artikolojn en PDF versio.

- Raymonde Coquisart fotokopias, enkovertigas kaj sendas paperan version al membroj kiuj ne havas retadreson.
- Pli ol **4000 personoj** ricevas la leteron kaj Nicolas Gaufillet zorge aligis membrojn de UFE al tiu dissenda listo.
- Vi povas legi la malnovajn leterojn tie : <http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv> kaj proponi al interesitaj personoj senpage aboni irante sur la saman retejon.

Monato	Numero	Malkovro	Libro de la monato
09/12	EA 28	Pourquoi adhérer à Espéranto-France	Bildvortaro en Esperanto et Komputeko
08/12	EA 27	L'espéranto à l'école	La elprovado – L'épreuve
06/12	EA 26	Sumo Esperanto : lisez un livre, sauvez le monde	La Princo ĉe la Hunoj (Le Prince chez les Huns)
05/12	EA 25	2012, année de Tibor Sekelj	Gvidlibreto por kompreni la internaciajn migradojn
04/12	EA 24	L'espéranto au bac	Tertrema katastrofo de Japanio 2011
03/12	EA 23	UK et les congrès de l'été	The Universal language
02/12	EA 22	Congrès national d'espéranto 2012	Stelsemantoj en la ora nordo
01/12	EA 21	Écoutez l'espéranto sur Internet avec Muzaiko	Kie ni povas trovi Dion ? demandis la eta porkido
12/11	EA 20	Les rencontres d'espéranto du Nouvel An	Kiel traduki
11/11	EA 19	Comment faire un bon café (espéranto) ?	Lupo Alberto
10/11	EA 18	Un petit tour de l'actualité musicale en espéranto	

1.10. Retejo kaj Arthur

Tio kio estis realigita en 2011:

- Enretigo de nova formulo por la letero Esperanto-Aktiv (...) (vidu en **1.9.**). Ekde novembro 2011, la letero ekzistas ankaŭ PDF-formate por printado. La printita versio estas sendita al UFE-membroj kiuj ne uzas interreton, de Raymonde Coquisart.
- Kreado de Twitter-konto @EsperantoFrance en januaro 2011 por informi pri novaj eldonoj.
- Aldono de serĉilo sur ĉefpaĝo por listigi la lokajn klubojn kaj iliajn kursojn/kunsidojn/agadojn.

En la reta datumbazo Arthur estis aldonita « persona spaco », ebleco ofertita al la membroj mastrumi iliajn poŝtajn datumojn, mendi librojn, aliĝi la asocion, aliĝi la kongreson. La adreso: <http://esperanto-france.org/perso/>

1.11. Rilatoj kun UEA

Claude Nourmont reprezentas UFE ĉe la komitato de UEA. Ŝi partoprenis ties kunsidojn dum la UK en Hanojo. Francoj estis la plej granda eksterazia grupo en la UK. Kiel ĉefdelegito de UEA por Francio rolas Renée Triolle.

UFE havas regulajn kontaktojn kun UEA. La sidejo zorgas pri perado de kotizoj kaj aliaj servoj. La komunikado inter la du asocioj fariĝas grandparte pere de la reto.

1.12. Prelegvojaĝoj

Dum la jaro 2012 rekorda nombro de prelegturneoj estis brile organizata de Yves Nicolas :

- Rodica Todor (Rumanio), marto 2012 – 8 urboj, artikoloj en *Ouest France*, ktp ;
- Roman Dobrzynski (Pollando), majo 2012 – 8 urboj, el kiuj la Kongreso de Esperanto en Francio, en Saint-Aignan de Grandlieu, artikoloj en *Le Dauphiné Libéré*, *Vosges Matin*, *Ouest France* ;
- Hori Jasuo kaj Toshinobu Arai (Japanio), septembro 2012 – 7 urboj, pluraj artikoloj kaj intervjuoj ;
- Anna Löwenstein kaj Renato Corsetti (Italujo), septembro 2012, tra Provenco kaj suda Francio – 6 urboj ; artikoloj en *La Provence*, *Le Dauphiné Libéré*.



- Eddy Raats (Belgio), oktobro 2012 – 5 urboj
- Svetlana Smetanina (Rusio), novembro 2012 – 11 urboj, el kiuj staĝo gvidita en Grésillon kaj partopreno al la Lingva Festivalo en Tour, artikoloj en *La Montagne*, *Ouest France*, ...;

Plurloke en la publiko ĉeestis ankaŭ neesperantistoj, kiuj tiel spertis utilecon de Esperanto kiel pontolingvo.

Ĉiuj informoj pri la prelegturneoj legeblas (franclingve) en la retejo de Esperanto-France : <http://esperanto-france.org/conferences>

1.13. Butiko

En 2012, ni printigis novajn dorssakojn kiuj estis disdonitaj dum la kongreso de Esperanto-France en 2012.

1.14. Sidejo

Interna skipo ŝmiris kaj farbis la plafonon post la renovigo de la elektra reto. Tiu skipo laboris dum pluraj semajnfinoj kaj ŝparigis grandan sumon por la asocio.

La tuta skipo de la sidejo provis daŭrigi la laboron kiel eble plej efike, envolvitaj de bruo kaj polvo.

La Sidejo de Espéranto-France sekve de ricevo kaj traktado de nenombreblaj telefonalkvokoj, retmesaĝoj same kiel poŝtleteroj adresitaj al la sidejo :

- preparis kaj sendis pli ol 720 mendojn al niaj membroj kaj aktivuloj;
- notis pli ol 900 (542 + 434 ?) aliĝojn al Espéranto France kaj abonojn al LME;
- notis pli ol 350 aliĝojn al UEA kaj al UK 2012;
- same kiel pli ol 270 abonojn al internaciaj revuoj

Ni prizorgis ankaŭ pri specifajn agadojn kaj projektojn :

- organizado de grupvojaĝo al UK 2012 (Hanojo, Vjetnamio);
- registrado de aliĝoj kaj mendiloj por Nacia Kongreso 2012 (Nantes);
- daŭrigas la laboro de ordigo kaj numerigo de nia arkiva trezoro, vi povas konsulti la retejon : www.arkivo.esperanto-france.org (respondeculoj Régis Fournier kaj Jean Lazert);
- kunorganizado (Federacio IDF) kaj akcepto de pluraj konferencoj, kunvenoj, renkontiĝoj.

La sidejo estas malfermata lunde, marde, merkrede je la 9a ĝis la 18a horo (post la 18a preskaŭ ĉiutage okazas kursojn). Ĵaŭdo estas rezervita por dosieroj traktendaj, sed ni ricevas ankaŭ antaŭvidintajn au pasantajn vizitantojn.

Kiel kutime pluraj eksterlandanoj vizitis la sidejon en 2012 (el Brazilio, Rusio, Japanio, Svislando, Hispanio...).

Vi estas bonvenaj dum viaj vojaĝoj en Parizo kaj tra Parizo, nia skipo (Liliane Bon, Hélène Le Bihan, Anne-Marie Chaney, Jean-François Mestelan, Jean-Louis Pouillet) plezure montros al vi la sidejon, la arkivon, la librojn...

1.15 Cours Internet

En 2011, Espéranto-Jeunes a transmis la responsabilité des cours Internet à Espéranto-France. Il existe 3 cours : le logiciel *Kurso de Esperanto*, le *Cours Gratuit d'Espéranto en 10 leçons* et le cours *Gerda Malaperis* d'un niveau plus avancé.

Ces cours sont corrigés par 73 correcteurs bénévoles. Sur les 12 mois d'octobre 2011 à septembre 2012, 338 élèves se sont inscrits et 56 ont été jusqu'au bout du cours qu'ils ont choisi.

Le cours est administré par Ingrid Malaquin, Axel Rousseau s'occupe des problèmes techniques et Emmanuelle Richard s'occupe d'envoyer aux élèves ayant terminé le cours un diplôme et un exemplaire de la revue *Le Monde de l'Espéranto*.

2. Komitato kaj membraro

Elektiita en Nantes (maje 2012), kunvenis 4 foje : maje 2012, oktobre 2012, januare 2013, maje 2013.

Reprezentas la membrojn :

- Michèle Abada-Simon
- Jeanne-Marie Cash
- Raymonde Coquisard
- Julia Hédoux
- Philippe Debrix
- Christian Lavarenne
- Sébastien Montagne
- Axel Rousseau

- Guy Camy
- Philippe Chavignon
- Karine Texier
- Didier Janot
- Aleks Kadar
- Xavier Dewidehem
- Claude Nourmont
- Anne-Émilie Ravache

Axel Rousseau
Julia Hédoux
Philippe Debrix
Sébastien Montagne
Anne-Émilie Ravache
Karine Texier

Estraro :


- Prezidanto:
- Vicprezidantino :
- Vicprezidanto eksteraj rilatoj : Véronique Bichon
- Kasisto:
- Vickasisto :
- Ĝenerala Sekretario :
- Vicsekretario :

Reprezentantoj de la asocioj (kontraktintaj) :


- Auvergne : Jean-Pierre Boulet
- Bretagne : Xavier Godivier
- Centre-Ouest : /
- France-Est : /
- Île-de-France : Didier Loison
- Languedoc-Roussillon : Véronique Bichon
- Midi-Pyrénées : Marion Quenut
- Nord : Claude Longue-Épée
- Poitou-Charentes : Marie-France Conde-Rey
- Provence : Monique Arnaud
- Rhône-Alpes : Mireille Besset
- Espéranto Jeunes (JEFO) : /
- FET : Frédéric Scibor
- FKEA : Marie-Thérèse Marin
- GEE : Michel Dechy

Kelkaj statistikoj pri la membraro kaj la membrara evoluo

Estis 553 membroj je fino de agadjaro 2011-2012 (30a de septembro 2012). La tendenco videble estas malkreska.



Jen kiel dispartiĝas la membroj laŭ Federacio.



3. Jarraportoj de la regionaj asocioj

3.1. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)

1. Membraro

La membraro de la federacio estas stabila kompare al pasinta jaro. Novaj membroj kompensas 2 forpasintojn en la jaro 2012 : Andrée DESAPT kaj Martine BARRAUD, eksaj UFE-membroj. La federacio nombras ĉirkaŭ 72 personojn : 45 en Puy-de-Dôme (63), 22 en Allier (03), 4 en Haute-Loire (43) kaj 1 en Cantal (15).

2. Administrado

En la federacio funkcias 3 oficiale registritaj esperantoasocioj : Clermont-Ferrand (63), Moulins (03), Issoire. Tri aliaj grupoj agadas kadre de kulturaj asocioj : Montluçon (03), Vichy-Bellerive (03) kaj Mozac (63). En la asocio kreita en Issoire en la jaro 2011, estis 4 membroj en la jaro 2012 kaj ekfunkciis kurso por komencantoj.

La Ĝenerala Asembleo de la federacio kunvenigis 25 membrojn en Clermont-Ferrand la 17-an de decembro 2011. Post la Ĝ.A. okazis Esperantofesto por celebri la naskiĝdatrevenon de L.L.Zamenhof.

3. Informado

Ekspozicioj estis organizitaj okaze de Asociaj Forumoj en Cournon (1/09/2012), Mozac (8/09/2012) kaj Clermont-Ferrand (22 k.23/09/2012). Krom tio la grupo de Montluçon faris unusemajnan ekspozicion en Dorat (03). Post

ties inaŭguro (28/03/2012) fare de la urbestro, la organizanto de la afero, Daniel Lachassagne, prezentis la internacian lingvon kaj Jacques Lepuil koncertis.

Nian regionon vizitis pluraj eksterlandaj esperantistoj : Aleksander MELNIKOV (6-9/12/2011), Michèle kaj Hubert DEMEYERE (22-25/02/2012), Rodica TODOR (4-27/03/2012), Svetlana SMETANINA (3-7/11/2012). Okaze de iliaj vizitoj, publikaj prelegoj estis organizitaj en Clermont-Ferrand kaj Mozac. Ĉiujfoje raportoj kun fotoj aperis en la ĵurnalo *La Montagne*.

Krom tio, niaj gastoj estis intervjuitaj en lokaj radioj.

La esperantistaj grupoj rilatas kun neesperantistaj organizoj : **Popolaj Universitatoj** en Clermont-Ferrand kaj Moulins, kultura kafejo *Les Augustes* en Clermont-Ferrand, asocio **EXEDRA** en Montluçon, **Réseau d'Échange du Savoir** en Vichy, Espace Culture kaj **Comité de Jumelage** en Mozac, en kiu ni celas enkonduki Esperanton kiel pontlingvon, por rilati kun ĝemelurboj en Italio kaj Hispanio.

Notindas ke kelkaj membroj de la ĝemeliĝa asocio lernas internacian lingvon.

4. Instruado kaj ekzamenoj

Diversnivelaĵoj funkcias en Clermont-Ferrand, Moulins, Vichy, Mozac kaj Issoire.

La federacio organizis ekzamenojn : en Cournon la 10-an de decembro 2011, en rilatoj kun FEI, por 7 kandidatoj kaj KER-ekzamenon en Clermont-Ferrand la 9-an de junio por 12 kandidatoj.

5. Naciaj kaj internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj

En la jaro 2012, unu reprezentanto de nia federacio ĉeestis la UK-on en Hanojo. Aliaj federacioj sekvis staĝojn eksterlande (Pollando, Slovakio), partoprenis renkontiĝojn en Germanio (Finjara Internacia Esperanta Festivalo), Hispanio (Internacia Kultura kaj Turisma Semajno), ktp.

3.2. Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio)

La Fédération regroupe 20 groupes locaux, dont certains sont eux-mêmes regroupés au sein d'associations départementales, dans les villes suivantes :

- **Côtes-d'Armor** : Saint-Brieuc, Saint-Quay-Perros, Lannion, Trédez-Loquemeau, Guingamp, Plélan-le-Petit et Dinan, regroupés dans l'association **Armor-Espéranto** ; Plouézec.
- **Finistère** : Quimper, Landerneau.
- **Ille-et-Vilaine** : Rennes, Saint-Malo, Montfort-sur-Meu, Chartres-de-Bretagne.
- **Morbihan** : Vannes, Lauzach, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient.

Tous les adhérents de ces groupes sont aussi adhérents de notre Fédération, qui y bénéficie d'un tarif spécial. Il faut y ajouter les membres individuels.

Montant de la cotisation 2012

- Adhérent à une association locale : 7 € par personne, 11 € pour un couple ;
- Membres individuels habitant hors Bretagne : 11 €, en Bretagne 20 € (pour inciter les adhérents à s'inscrire par l'intermédiaire d'une association locale) ;
- Scolaires, étudiants, chômeurs : 3,5 €.

Nombre d'adhérents en 2012 : 269 cotisations dont 253 par l'intermédiaire des groupes locaux.

Usagers

Il s'agit des participants à diverses activités, non adhérents à notre Fédération :

- Rencontres Internationales de Plouézec (110 participants + public lors des soirées culturelles) ;
- Stages de fin de semaine (131 participants) ;
- Représentations de théâtre (60 participants) ;
- Soirées-débats ouvertes au public (en 2012, 23 conférences en Bretagne dont 19 d'un Cubain, une conférence d'un Japonais (100 participants), d'un Polonais, d'un Ukrainien et d'un Coréen) ;
- Conférences sur la langue espéranto (2 en 2012) ;
- Animations dans le cadre de la *Semaine de l'Europe* (1 en 2012) ;
- Cours d'initiation lors des forums de langue (3 en 2012) ou sur nos stands lors des forums d'associations, foires bio, forums « partir à l'étranger », forum social, etc. (une quinzaine en 2012) ;
- Expositions, stands (Semaine de l'Europe, forums de langue, forums d'associations...) (une quinzaine en 2012).

Enseignement

- Cours hebdomadaires 2012/2013 : 181 élèves répartis dans 12 associations locales ;
- Stages intensifs organisés à Saint-Brieuc (51 participants en 2 stages) et Vannes (80 participants en 5 stages) ;
- Cours d'initiation lors des forums de langues (Lannion, Guingamp, Brest) ;
- Cours par correspondance auprès d'organismes nationaux ;
- Cours par internet sur des sites gratuits.

1. Actions de la Fédération

- **Édition du bulletin** de liaison et d'information Espéranto-Bretagne *La Verda Triskelo* 2 fois /an (rédacteur Jannick Huet) ;
- **Édition d'un bulletin international** une fois par an, *la Verda Triangulo*, commun à trois fédérations :
 - Fédération Bretagne : le responsable est Bert Schumann ;
 - Fédération de la Région Saxe (Allemagne) : les responsables sont Benoît Philippe et Steffen Eitner ;
 - Fédération de la Région Silésie (Pologne) : la responsable est Teresa Pomorska ;

Organisation de tournées de conférences d'étrangers espérantophones

- **Du 2 mars au 6 avril 2012, le Cubain Miguel Angel Gonzalez Alfonso**, dont l'organisation, les frais de voyage et de séjour ont été pris en charge par notre Fédération, est intervenu dans des **soirées-débats ouvertes au public auprès de 19 associations bretonnes**, a participé à notre Assemblée Générale le 25 mars 2012 à Loudéac et est intervenu au congrès national des cheminots espérantophones à Angers du 2 au 4 avril 2012.
- Du 23 au 25 mai 2012, organisation de visites et conférences, dans le cadre d'une tournée organisée par Espéranto-France, du **journaliste polonais Roman Dobrzynski**, à Rennes et Montfort-sur-Meu.

Jumelage

- Relations avec les associations d'espéranto de **Jinan et de Zaozhuang (Shandong)** dans le cadre du jumelage des deux fédérations d'Espéranto de Bretagne et du Shandong.

Édition

- Pas d'édition cette année. La vente du livre *Anecdotes sur Confucius* trilingue français-chinois-espéranto, ainsi

que du CD de chansons bretonnes traduites en espéranto, édités par notre Fédération, se poursuit.

Chœurs MEVEN et INTERKANT'

- Notre chœur régional MEVEN prépare avec le chœur national **INTERKANT'** une conférence-concert en espéranto sur l'opéra *Carmen*, sous la houlette de Franjo Lévêque, chef de chœur et espérantophone de Saint-Brieuc, et a participé en 2012 à diverses répétitions, avec mise en scène, avec en perspective des concerts en 2013.

Internet

- **Gestion du site internet** <http://bretonio.esperanto-france.org/> de la Fédération par Bert Schumann, bénévole de l'association rennaise affiliée et Manjo Clopeau, et
- Gestion des inscriptions et de la modération de la liste de discussion de nos membres bretonio@yahooigroupes.fr par quatre bénévoles.

Événements

La FEB effectue directement des animations à la demande, là où n'existe pas d'association locale d'espéranto, par exemple :

- Janvier 2012 stand au **forum *Partir à l'étranger*** organisé à La Guerche-de-Bretagne (35) par le Point Information Jeunesse de Vitry et en avril 2012 ;
- Avril 2012 : conférence au **Rotary-Club** de la Guerche.

La FEB joue son rôle de conseil auprès des clubs, participe à la coordination des actions régionales, et recherche des partenaires et des correspondants étrangers.

Organisation de **l'assemblée générale**, qui a lieu chaque année en mars à Loudéac.

2. Actions de nos associations adhérentes

Elles sont chargées de la diffusion de la langue espéranto et pour ce faire organisent des cours, stages, examens, rencontres avec des étrangers espérantophones, correspondances collectives, participent à des opérations de jumelage, à des forums de langues, des forums d'associations et diverses manifestations.

Elles réunissent aussi leurs membres autour d'activités en espéranto dans des domaines divers : jeux de rôle, théâtre, chant choral, randonnée, informatique, etc.

En plus de ces actions traditionnelles, certaines réunissent leurs membres autour d'activités remarquables.

Voici quelques-unes de leurs opérations phares au cours de l'année 2012, en plus ou autour de l'accueil de conférenciers étrangers de Cuba et de Pologne.

Côtes-d'Armor

- Accueil, de janvier à septembre 2012, **du jeune lycéen brésilien Igor Ferreira**, en provenance de la ferme-école brésilienne **Bona Espero**, créée et gérée par des espérantophones.
- Accueil, dans le cadre d'une tournée nationale, de **deux Japonais** et organisation d'une soirée-débat sur Fukushima, avec plus de 100 participants.
- Interventions sur la langue espéranto à la MJC, au lycée Ernest Renan et à l'Université de Saint-Brieuc.
- Organisation de deux **stages d'espéranto de fin de semaine**, avec **27 et 24 participants**.
- Participation au **festival des langues de Lannion** (ENSSAT), au printemps des langues de Guingamp, à la foire bio *Biozone*.

- Projections du film *Espéranto* dans des salles de cinéma à Dinan et Saint-André-des-Eaux et au Foyer du jeune Travailleur de Dinan.
- Sous-titrage en espéranto du film *Le petit jardin des écoliers*. Les **jeunes qui pratiquent le woofing** au « petit jardin des écoliers » participent aux cours d'espéranto.
- Partenariat avec diverses associations (ESS, RESIA, GuidEurope).
- À Plouézec, du 18 au 25 août, les **16es Rencontres internationales** ont réuni 110 personnes d'une dizaine de nationalités. Membres d'honneur : le Népalais Razen Manandhar et le jeune Brésilien Igor Ferreira. 7 niveaux de cours, tourisme, ateliers de théâtre, chant choral, yoga, informatique, jeux de société, dessins celtés, spectacles et concerts.
- Les Chinois espérantistes de **Canton** ont organisé en janvier 2012 un mois de stage intensif d'espéranto à **l'île de Hainan** et, à la suite de leur séjour aux rencontres internationales de Plouézec 2011, y ont invité les Bretons. Deux membres des Côtes-d'Armor y ont participé.

Finistère

- Stand au **forum des langues** de Brest.
- Rencontre avec l'espérantiste et **choriste gallois Bill Chapman** à Châteauneuf-du-Faou.
- Participation au salon multilingue du **Livre Jeunesse** à Pluguffan.
- Participations aux actions de **solidarité internationale** dans le cadre du CICODES et de la Mairie de Quimper, à la *Fête des Droits de Toutes les Couleurs* à Quimper.

Ille-et-Vilaine

- Participation à la **Journée de l'Europe** (9 mai) par une exposition et une conférence sur l'espéranto à l'Hôtel de la Communauté de Communes de Montfort-sur-Meu.
- Soirée-débat ouverte au public sur **Cuba** à Rennes, Montfort et Saint-Malo à l'occasion de la tournée du Cubain espérantophone Miguel Angel Alfonso Gonzalez.
- Soirée-débat ouverte au public (24 mai) à Montfort sur la **Pologne**, avec le journaliste polonais Roman Dobzynski, dans le cadre d'une tournée nationale organisée par Espéranto-France, en présence du Président de Montfort-Communauté, de plusieurs maires et représentants de comités de jumelage.
- Soirées-rencontres et repas en commun des espérantophones des clubs de Rennes, Montfort et Chartres-de-Bretagne avec les espérantophones cubain et polonais.
- **Visites commentées** de Rennes en espéranto auprès des étrangers espérantistes.
- Correspondance avec un Allemand de **Erlangen**, ville jumelée avec Rennes.
- Mise en place d'un **atelier théâtre** par les **jeunes étudiants rennais** membres de l'association Espéranto-Rennes.
- Arrivée à Rennes d'un nouvel enseignant pour les débutants, Stéphane Blaevoet.
- À **Saint-Malo**, accueil et conférence d'un espérantophone **ukrainien**.

Morbihan

Vannes

- Les 5 Journées de **stage** « Samedis espéranto » ont attiré plus de **80 personnes**, avec 3 niveaux de cours et divers ateliers.
- **L'activité théâtre** a débouché sur une représentation lors de la Fête Zamenhof (janvier 2012), avec une soixantaine de spectateurs.
- Organisation de la *Litera Turo*, **concours international de Belles Lettres**.
- Soirée-débat avec le **japonais Hori Jasuo (sur Fukushima)** et accueil d'un espérantiste **coréen**.
- Participation au **Forum Social** de Séné.

Hennebont

- Dans le cadre du **jumelage** avec la ville allemande de Kronach, accueil d'un espérantiste allemand pendant une semaine et visite de 2 espérantistes de Hennebont dans la ville allemande.

Presqu'île de Rhuys

- Présentation du film *Espéranto* dans des salles à Arzon et Saint-Gildas-de-Rhuys.

En conclusion, l'accueil en 2012 de nombreux étrangers du monde entier dans nos clubs et les familles de nos membres (Cubain, Brésilien, Japonais, Coréen, Népalais, Gallois, Allemand, Polonais...) et l'organisation des Rencontres Internationales à Plouézec ont permis à nos adhérents de tisser des liens d'amitié très profonds, en leur offrant une ouverture au monde incomparable.

3.3. Fédération Espéranto-Centre-Ouest (Centrokcidento)

(Jarraporto ne ricevita)

3.4. Fédération Espéranto-France-Est (Orientfrancio)

Bone funkcia asocio ankaŭ ŝuldas la bonan funkciadon al la rutina laboro de siaj agantaj membroj.

Rutinas do la afiŝado de la eventoj kaj diversaj informoj sur nia retpaĝaro <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr> fare de nia kasisto André GROSSMANN, rutinas la funkciado de nia libroservo fare de Jean-Luc THIBIAS, rutinas la produktado de nia bulteno *LA INFORMILO* fare de ties ĉefredaktoro (kiu jam produktis 160 numerojn ekde 40 jaroj). Helpas lin André GROSSMANN, Jean-Luc THIBIAS kaj Edmond LUDWIG.

LA INFORMILO eĉ parte aperas kolore kaj eldoniĝas je 250 ĝis 300 ekzempleroj.

La estraro ankaŭ kunlaboris kun la organizinto de la sukcesega printempa staĝo en La Petite Pierre, Bertrand WICK. Elstare li sukcesis involvi neesperantistan asocion de lokaj poetoj, kiuj ĉeestis la distran vesperon kun la itala kantisto MANUEL kaj prezentis siajn verkojn.

Esceptaj agadaroj ne multas ĉi-jare. Nia komitatano Alain COLLIGNON proponis eldonadon fare de la poŝto de poŝtmarko honore al la 125-jariĝo de Esperanto. Post komuna propono elekto de taŭga bildo, estas finfine André GROSSMANN, kiu prizorgis la mendojn... kiuj ne sukcesis pro rifuzo de la poŝtaj servoj eldoni poŝtmarkojn kun nefranca tekstero (Internacia lingvo) pro la leĝo TOUBON. Elturniĝis André GROSSMANN, kiu produktis etiketojn samaspektajn, kiujn li sendis al la petintoj kaj kiujn eblas ĝlui sur kovertojn.

Fervore reprovigis la dekanon de la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Sociaj Sciencoj de Mulhouse, Yann Kerdiles funkciigi kurson en la Universitato de Alta Elzaso. Li organizis kunvenon sufiĉe bone vizitita, en kiu ĉeestis kaj estraranoj, komitatanoj kaj membroj de EFE kaj Cyrille HURSTEL, kiu tie prelegis. Sed la minimuma nombro de 12 gestudentoj ne estis atingita.

Roberto KUENY enketis por trovi staĝejon por la printempa staĝo 2013 (kiun li pretintus organizi en Elzaso). Ne eblis trovi staĝejon proksiman al lia loĝloko. Li do rezignis, sed sin pretigis transpreni la taskon François Xavier GILBERT en Benoîte VAUX. Pri serĉado de la intervenantoj zorgis Edmond LUDWIG. La aliĝilon redaktis kaj enretigis André GROSSMANN.

Nia dissendolisto ĉe Yahoo havas 77 membrojn Alzaco-Loreno@yahoogroupes.fr

3.5. Fédération Espéranto-Île-de-France (Francilio)

1. Administrado

Membraro

	2011	2012	2013
Membroj de la federacio	144	122	
Nombro de lokaj asocioj kaj kluboj	9	9	
Partoprenantoj en staĝoj	8	8	
Partoprenantoj en la unuanivela kurso	5	4	
Partoprenantoj en la duanivela kurso	4	5	

Jarkunveno

Ĝi okazis sabaton, la 24an de marto 2012 en Malakoff (92) en ĉambro de la Maison de la Vie Associative.

Ses personoj sin proponis por ses mandatoj en la komitato (5 trijaraj mandatoj kaj 1 libera mandato de 2 jaroj) : Michèle Abada-Simon (22 el 24 voĉoj), Jean Delhomme (20/24), Aleks Kadar (21/24), Olivier Maury (21/24), Kevin Morel-Fournier (21/24), kaj Cyrille Pouillet (14/24). Ilin elektis la partoprenantoj. La libera mandato estis aljuĝita al Cyrille Pouillet.

Posttagmeze, post komuna tagmanĝo en apuda restoracio kaj komuna promonado, la partoprenantoj vizitis la ekspozicion *Maude MARIS & Alice PICHELIN*.

Komitataj kunvenoj

Ili okazas trimestre en la sidejo en Februaro/Marto (antaŭ la Jarkunveno), Junio, Septembro kaj Decembro. Kaj unu plia okazas tuj poste la Jarkunveno, por ke la komitato elektu la novan estraron.

Rilatoj kun UFE

- Didier Loison, delegito ĉe la komitato de Espéranto-France.
- William Dumoulin, vic-delegito ĉe la komitato de Espéranto-France.
- Multaj bonvolemluloj de nia federacio helpas ĉe la Cerisaie pri diversaj taskoj.
- Pluraj franciliaj esperantistoj estas membroj de la komitato de UFE kaj partoprenas en la vivo de tiu nacia asocio.

2. Agadoj

Budoj

- La federacio deĵoris en pluraj forumoj de asocioj en multaj franciliaj urboj.
- En septembro, okazis la *Fête de l'Huma*. La **Fédération Espérantiste du Travail** (FET) provizis budon. La gejunuloj de **Espéranto-Jeunes (JEFO)** prizorgis la aferon kaj esperantistoj de nia federacio helpis ilin.

Prelegturneoj

- 11a de majo, Roman Dobrzynski (en la sidejo; preleg-turneo organizita de Esperanto-France) ;
- 19a de junio, Martin Strid (en la sidejo) ;

- 24a de aŭgusto, Dennis Keefe (en la sidejo) ;
- 22a de oktobro, Eddy Raats (en la sidejo de SAT-Amikaro, turneo organizita de Esperanto-France) ;
- 29a de novembro, Svetlana Smetanina (en la sidejo, preleg-turneo organizita de Esperanto-France) ;
- 1a de februaro 2013, Mikaelo Bronstein (en la Domo de Asocioj de la 4a arondismento, bufedo ofertita de la federacio, preleg-turneo organizita de Esperanto-France).

Café Espéranto

Café Espéranto (cafe-esperanto.blogspot.fr) estas ĉiunmonata rendevuo por informiĝi kaj informi scivolemulojn, paroli kun esperantistoj kaj travivi agrablan momenton. Origine organizita en Parizo, sendepende de la asocio, nun estas kelkfoje organizata samtempe al konferencoj de la federacio. La retejo de la federacio kaj la sidejo informas pri ĝia okazo.

Aliaj agadoj

- Pluraj membroj agadis por la petskribo « Espéranto au Bac » ;
- Subteno al la Zamenhof-festo, organizata de Cheminots;
- La retejon de la federacio (www.francilio.org) prizorgas Emmanuelle Richard kaj Didier Loison. Ĝi estas loko por varbi pri la kursoj, la staĝoj, la ekzamenoj, la sabatoj de la federacio kaj aliaj agadoj.

3. Instruado

Kursoj (2011/2012)

- **Komencantoj** : Michèle Abada-Simon ;
- **Progresantoj** : Axel Rousseau.

Kursoj (2012/2013)

- **Komencantoj** : Michèle Abada-Simon, merkrede, de la 18a ĝis la 20a ;
- **Progresantoj** : Axel Rousseau kaj William Dumoulin, marde de la 18a ĝis la 20a ;
- **Trejnresio por la KER ekzamenoj (B1-B2-C1)** : lunde, de la 18a30 ĝis la 20a, ekde la 21a de januaro 2013, organizita de Didier Janot.

Babilrondoj (2011/2012)

- Por **progresantoj**, ĉiun mardon de la 18a ĝis la 19a30, organizata de D. Janot ;
- **Stranga IDEujo**, ĉiun jaŭdon de la 18a ĝis la 20a, organizata de Michèle Abada-Simon kaj William Dumoulin (francilio.org/Diversaj-kreivaj-agadoj).

Babilrondoj (2012/2013)

- Por **progresantoj**, ĉiun lundon de la 18a ĝis la 19a30, organizata de D. Janot (ekde januaro 2013, okazas la Trejnresio por KER ekzameno) ;
- **Stranga IDEujo**, ĉiun jaŭdon de la 18a ĝis la 20a, organizata de Michèle Abada-Simon kaj William Dumoulin (francilio.org/Diversaj-kreivaj-agadoj) ;
- **Babilrondo**, po 2 lundoj monate de la 14a30 ĝis la 16a30, organizata de Sonia Amariglio.

Staĝoj (2012)

Plurfoje okazis finsemajnaj staĝoj por komencantoj (francilio.org/stage-esperanto), gviditaj de Michèle Abada-Simon :

- 21-22a de aprilo 2012 ;
- 27-28a de oktobro 2012.

Venontaj agadoj

- **6-9a de februaro 2013**, Expolangues ;
- **8a de junio 2013**, KER-ekzamenoj ;
- **15a de septembro 2013**, Fête de l'Huma ;
- **Septembro**, forumoj de asocioj en pluraj franciliaj urboj.

3.6. Fédération Espéranto-Languedoc-Roussillon (Langvedoko-Rusiljono)

1. Regiona kunordigado

Membraro

	2011	2012
Béziers	24	27
Montpellier	24	24
Nîmes	11	10
Sendependaj membroj	37	34

Ne estas signifa evoluo inter 2011 kaj 2012.

Federaciaj kunsidoj

Okazis ĝenerala asembleo la 31an de marto en Nîmo, kaj plia kunveno la 27an de oktobro en Montferrier-sur-Lez. Nenio nova, la renovigo de la estraro okazos en aprilo 2013.

2. Informado kaj komunikado

La SudFrancia Stelo aperis kvarfoje. La ĉefredaktoro Christian Mouré bonege regas sian taskon, helpitan de pluraj relegantoj kiel Josée Boccadifueco, Arnaud Lagrange. Ĉiu grupo partoprenas, sendante regule artikolojn pri la lokaj okazaĵoj.

Oni funkciigis novan diskutliston por permes al ĉiuj federaciaj membroj sciigi al la aliaj aŭ interŝanĝi pri eventoj : membroj-langvedoko-rusiljono@googlegroups.com.

3. Instruado kaj ekzamenoj

Estas kursoj por komencantoj kaj por progresantoj en Montpellier, Béziers, Nîmes, Lozère.

4. Kulturo kaj aranĝoj

Esperantistoj el la diversaj partoj de la regiono partoprenis al diversaj forumoj por konigi Esperanton : en Béziers, Montpellier, Nîmes, Lozère, ktp.

- **La 2a de Junio** : kruzado sur la Suda kanalo de Béziers ĝis Agde.
- En **Novembro**, elsendo je **Radio Sommières**.
- La esperantistoj de la regiono regule gastigas eksterlandanojn por vivigi la klubajn vivojn.
- En **Montpellier**, Anna Lowenstein kaj Renato Corsetti prelegis dank'al la turneoj organizitaj de

Espéranto-France.

- Esperantistoj de la regiono partoprenis al diversaj aranĝoj : UK en Vjetnamio, IJK en Vjetnamio, FESTO en Métabief, kultura kaj turisma kongreso en Hispanio, turisma semajno en Greziljono...
- En 2013, kelkaj partoprenos en : UK en Islando kun karavano en Eo Fr, IJK en Israelo ktp.

3.7. Fédération Espéranto-Midi-Pyrénées (Sud-Pireneoj)

1. Regiona kunordigado

La membraro iomete kreskis de 96 ĝis 109 (23 el CEEA, 80 el EKC, 4 en Albi kaj 16 individuaj membroj de UFE, sed deko da membroj estas en pluraj listoj aŭ ne loĝantoj de la regiono).

Nia jarkunsido okazis la 11/12/2011 en Tuluzo, okaze de la Zamenhof-festo.

Partoprenis 14 personoj, el 5 departementoj, kaj kelkaj observantoj, el Pau (ekster la regiono).

La asocio ne estis reprezentata dum la 3 **ufe-komitatkunvenoj de 2012**.

2. Informado kaj komunikado

Nia asocio havas **informbultenon** kaj **retejon**. Aperis nur unu numero (januaro) de la *Cirkulero de Midi-Pyrénées*, interna bulteno, sendita kutime rete (papere al tiuj sen retadreso). Tiu ĉi estis sendita al ĉiuj membroj, kune kun la *Krokodil'* de EKC.

La retejo nun kiel paĝo de la portalo de **Esperanto en Midi-Pyrénées** La federacio. Estas paĝoj pri la federacio, paĝoj laŭ departemento, komunaj paĝoj kaj aparta blogo por *La Cirkulero*. Marion kaj parte Vincent respondecas pri ĝi, la ĝisdatigo estas nun taŭga. <http://esperanto.toulouse.free.fr>

Notindas, ke la arieja asocio CEEA nun havas propran retejon **esperanto.ariège.free.fr** kaj ke **Esperanto 65** havas novan blogon.

Nia Ekspozicio de 12 paneloj *Diversité des Langues et Espéranto* estas regule uzata de la lokaj kluboj en Toulouse kaj Aveyron. Rimarkenda ke la ŝtato malboniĝis.

La lokaj asocioj prizorgis **standojn en diversaj manifestacioj**:

- Forumoj de Lingvoj kaj de asocioj en Tuluzo (10), Ariège, Aveyron, kaj Tarbes ;
- Libro-foiroj en Aveyron ;
- Lernejoj (en Ariège kaj en Aveyron), Universitato (Toulouse).

Radioelsendoj pri esperanto okazas regule en Tuluzo (malpli ofte nun), Villeneuve d'Aveyron. Tiuj de Tuluzo povas esti interrete aŭskultataj ĉe <http://canalsud.net>, tiuj de Villeneuve ĉe <http://cfmradio.fr>

Projekto de Christophe por konigi esperanton en la departementoj sen asocioj.

(Vidu la aneksitan dokumenton « Bilan : actions en Midi-Pyrénées en 2012 »).

3. Instruado kaj ekzamenoj

- **Kursoj** regule okazas iniciate de lokaj grupoj : Tuluzo (du niveloj), Ariège (Mirepoix, Laroque d'Olme, Foix, Verniolle), Tarn et Garonne : Lavaur, Albi (2 niveloj). 1 kurso en Hautes pyrénées (ĉiusemajne en Banjeroj de Bigoro).
- Tri **semajnfinaĵoj** okazis sukcese en Arrout (Ariège), organizitaj de EKC (malpli da homoj ol kutime).

- EKC organizis KER **ekzamenon, samtempe kiel en 28 urboj**. (Estas de nove planita tutmondan por junio 2013).

4. Kulturo kaj aranĝoj

- **La tradicia Zam'fest** (11/12) kunvenigis sesdekon da esperantistoj el la regiono en Tuluzo, por festmanĝo, foiro de asocioj, libroservo, **koncerto de Tifen + Vjera**. Ĝi estis interasocia aranĝo (ankaŭ kun la Fervojistoj).
- **Krokodila Renkontiĝo** : 25 homoj partoprenis el 6 diversaj landoj dum 4 tagoj (de 27-a de Aprilo ĝis 1-a de Majo, en Arrout)
- **Koruso staĝo en La Bastide/l'hers** (Ariège) – De la 17-a ĝis 25-a de februaro.
La CEEA organizis sian tradician 18-an korusosemajnon, sub gvido de la kataluno Xavier Rodon, kun 10 partoprenantoj.
- **Semajno de Esperanto en Tuluzo** : unu semajno por prezenti esperanton en diversaj lokoj de Tuluzo, per diversaj okazaĵoj, inter ili spektaklo de Gijom kaj prelego de Jasuo Hori.
- **Turneo de Jasuo Hori** : Fine de septembro : ĉeestis 45 homoj en Tuluzo kaj 90 en Tarbezo, kie ĝi estis kunorganizita de **Esperanto 65** kaj **Nucléaire ? Non, Merci !** 65 kaj estigis regulan kunlaboron por francigi la kronikojn de Jasuo kaj por diskonigi.

Prelegoj de eksterlandanoj

Ĉi-jare nia volontulino estis Zsofia, el Hungario. Ŝi restis nur unu monaton kaj unu semajnon. Invitita de EKC, ŝi prezentis sian landon en Toulouse, Albi, Foix, Bagnères-de-Bigorre kaj Pau. Ĉifoje, nia subteno financa ne okazis, la kluboj pagis la tutan vojaĝadon.

Raportis Marion Quenut

5. Bilan : actions en Midi-Pyrénées en 2012

Montauban

- Contact a été pris avec la MJC, qui a accepté de mettre ses locaux gratuitement pour un atelier de découverte de l'espéranto. Une première tentative a été fixée au 5 mai, mais cet atelier a dû être annulé en raison d'un nombre insuffisant d'inscrits (seulement 3 personnes). La MJC a accepté le principe d'attendre la rentrée 2012 pour reprogrammer un atelier.
- Le 23 septembre, nous avons tenu un stand à l'occasion de la foire **Biosynergie**. Une petite dizaine de contacts ont été pris, l'atelier – cette fois prévu pour le 10 novembre – a pu être annoncé aux gens de passage.
- Le 10 novembre, l'atelier a cette fois-ci réuni 9 participants. Certains d'entre eux ont indiqué être intéressés par des cours.

Beauvais-sur-Tescou

- Robert Viader, animateur du repaire des AMG local, m'a invité à participer à un débat sur l'espéranto. Une dizaine de participants ont été informés.

Albi

- Le cours d'espéranto a été reproposé au programme de l'**Université Pour Tous**. Malgré 4 personnes intéressées, ce n'était pas suffisant et l'UPT l'a donc annulé.

Cahors

- Comme à Montauban, un atelier avait été programmé à la MJC au printemps (le 26 mai). Là encore, il a été annulé (seulement 2 inscrits) et repoussé à la rentrée 2012 (le 27 octobre). Cette fois-ci il a pu se faire avec 6

participants, dont certains seraient intéressés par des cours.

Cordes/Ciel

- Un stage débutant a été organisé par la médiathèque (grâce à son directeur Paul Sanda, un espérantiste) les 9 et 10 juillet. Moins de participants que prévu en raison d'imprévus de dernière minute (4 personnes au lieu de 6).

Gaillac

- Nous étions présents pendant les deux journées de la foire Biocybèle (plus grande foire bio du sud-ouest). Bilan positif, malgré les difficultés d'organisation (le forum des langues de Toulouse avait lieu en même temps).

Revel

- Suite à une initiative de Roland Alric, un contact a été établi avec l'AVF et un atelier de découverte a pu être présenté le 6 décembre. Bilan un peu décevant, car nettement moins de participants que prévu (5 au lieu d'une dizaine). Plusieurs contacts de personnes intéressées par un stage débutant ont toutefois été collectés.

Projets en cours

- Un atelier est prévu à Auterive le 10 janvier. La MJC de Cahors a repris contact avec moi en vue d'y organiser un stage débutant. EKC prépare une nouvelle formule d'apprentissage combiné (à distance + regroupement) appelée *formation Lerner*!

Projets à venir

- Pour cette deuxième année, la priorité sera donnée à l'information avec la mise en place d'ateliers de découverte pour deux raisons :
 - Les déplacements hebdomadaires que nécessite un cours sur place sont trop contraignants. Ils occupent une trop grande partie de mon temps, que je pourrais investir sur d'autres projets à Toulouse ou pour Espéranto-France (projet de création d'un nouveau manuel) ;
 - Ouvrir un cours dans un lieu où aucune association n'existe, où il n'y a pas ou peu de contacts, et où aucune campagne d'information n'a été faite au préalable n'est pas pertinent et voué à l'échec (exemple d'Albi et de Montauban).

Pour l'instant, je continue de proposer les ateliers de découverte à titre bénévole. À terme, lorsque cet atelier aura atteint un niveau de maturité (j'estime que ce sera bientôt le cas), j'envisage d'en faire une prestation payante à proposer à des associations et structures (l'idée est qu'il reste gratuit ou à prix libre pour les participants eux-mêmes). En attendant ce moment, il reste nécessaire de couvrir les frais de communication, les supports imprimés, et les défraiements (essentiellement le déplacement). C'est pourquoi je demande à la fédération une enveloppe de 250 € pour poursuivre mon action sur la région.

Ceci ne veut pas dire que j'abandonne l'idée de proposer de l'enseignement, mais je le ferai dans un second temps et sous une forme différente : stages débutants ponctuels ou cours express sur quelques semaines.

raportis Christophe

3.8. Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancio)

1. Regiona kunordigado

Membraro (kluboj, individuoj) kaj evoluo

- Arras-Espéranto : 23
- Somme-Espéranto : 22
- Boulogne-Espéranto : 0
- Dunkerque-Espéranto : 15
- Lille-Villeneuve-Espéranto : 24
- Valenciennes-Espéranto : 15
- Izoluloj: 19
- Entute nia federacio nombras 118 membrojn. En 2011 ĝi nombris 99 (sed tiam Somme-Espéranto ankoraŭ ne estis enkalkulita).

Federaciaj kunsidoj, kongresoj

- Nia federacia komitato kunsidis dufoje en 2012, la 17an de marto, kaj la 24an de Novembro.
- Kongreso okazis la 15an de Aprilo en Wavrans-sur-Ternoise, kun ĝenerala asembleo, ceremonio en la tombejo de Héricourt kie nia federacio renovigis la tombon de konata pioniro de Esperanto Emile Grosjean-Maupin, kaj turismaj vizitoj en la ĉirkaŭaĵo posttagmeze.

Rilato kun UFE

Pluraj federaciaj membroj en la diversaj instancoj de UFE. Claude Longue-Épée reprezentas tie nian federacion

2. Informado kaj komunikado

Federacia gazeto, federacia retejo

Nia federacia gazeto, la *Norda Gazeto*, aperis trijfoje. La nova skipo starigita en 2011 efike kaj bonege kunlaboras, kun Claude Longue-Épée kiel ĉefredaktoro, Cyrille Découture kiel enpaĝiganto, Claude Longue-Épée kaj Pascal Vilain kiel korektantoj, kaj France kaj Richard Valet por presado, enkovertigo kaj sendado.

Nia dulingva federacia retejo ankaŭ konsultebblas : <http://esperanto.nord.online.fr/fr/index.htm>

Informado en diversaj medioj (foiroj, lernejoj, ktp.)

Michel Dechy, prezidanto de Lille-Villeneuve-Espéranto partoprenis en la prikultura semajno de la kolegio Molière kaj en kolegio Saint-Exupéry de Hellesmes, ambaŭ en Majo. Kiel lastan jaron, labazaj lernejoj Anatole-France kaj Picasso invitis Michel DECHY, kiu proponas tri prelegojn (prezentado, matematika kurso en Esperanto, sorobano en Esperanto). Michel ankaŭ prezentis Esperanton en lernejo en Seclin.

Tiuregiona federacio: jarraporto de la jaro 2012

Niaj diversaj kluboj partoprenis en Forumoj pri Asocioj (Araso, Lille, Villeneuve d'Ascq, Valenciennes, Nœux-les-mines, Bersée...), en Festivaloj de lingvoj (Lille, Dunkirko, kaj aliaj kulturaj aranĝoj (Salon du livre en Araso, Stratbazaro en Lille, Salono de la aŭtoroj kaj kolektantoj en Villeneuve d'Ascq, Festivalo de la bildstrio en Lys-les-Lannoy, nacia kongreso de la « naturamikoj » en Gravelines, partopreno en manifestacio organizita de Mouvement de la Paix en Araso.

Michel Dechy plurfoje prelegis: pri *Esperanto kaj la lingva diverseco en Eŭropo* en Framécourt, aliaj prelegoj en Villeneuve d'Ascq (*Nord Madame*) kaj en Valenciennes.

Partopreno en landskalaj kampanjoj : la federacio aktive agadis por instigi homojn subskribi la peticion por enigi Esperanton en la abiturientan ekzamenon.

3. Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj, staĝoj, nombroj da lernintoj

Diversaj kursoj estas organizitaj de niaj kluboj kun (komence de la lerneja jaro 2012-2013) :

- En Dunkirko : 2 komencantoj, 6 progresantoj ;
- En Valencieno : 3 komencantoj, 4 progresantoj ;
- En Araso : 18 partoprenantoj ;
- En Nœux-les-Mines : 6 gelernantoj ;
- En Villeneuve d'Asq : 5 komencantoj kaj 3 lernantoj je la dua nivelo ;
- En Bersée : 7 progresantoj ;
- En Lille : 3 komencantoj en la kvartala urbodomo de Lille-Centre ;
- En Oignies : konversacia rondo kun 3 membroj, ĉiun merkredon posttagmeze.

Someraj staĝoj estis organizitaj de Lille-Villeneuve-Espéranto julie kaj aŭguste.

Eŭropa rendevuo en Stella-Plage

Nia federacio organizas ĉiujare Eŭropan Rendevuon, kaj en 2012, la 24a rendevuo okazis trianfojn en Stella-Plage. Ĝi estis granda sukceso dank'al la entuziasmoplenaj organizantoj, nia federacia prezidantino, Arlette Plutniak, kaj ŝia edzo Edmond. Partoprenis 94 homoj.

La laborgrupojn gvidis Claude Jausions por la komencantoj, Sylvain Lelarge por la progresantoj, Katalin Kováts por la preparado al la Eŭropaj Referenckadraj Ekzamenoj, kaj Daniel Moirand kiu gvidis grupon pri literaturo.

Belega koncerto de Jacques Yvart okazis sabate vespere, dimanĉe matene promenadoj kaj vizitoj estis organizitaj kaj meso celebrata de pastro Benoît Ente kaj malfermita al ekstera publiko. Dimanĉe posttagmeze prelegis la familio Kováts-Lelarge pri kolektitaĵoj.

Federaciaj ekzamensesioj, nombro da ekzamenitoj:

Nia federacio organizis ekzamensesion la 24an de junio 2012 en Lille sed estis nur du kandidatoj (pro diversaj kialoj: transloĝiĝoj, KER-ekzamenoj...)

KER-Eksamensesio

La 9an de Junio estis organizita de UEA, sub la gvido de Katalin Kováts, mondskala ekzamensesio. Nia federacio, kaj precipe Arlette kaj Edmond Plutniak organizis lokan sesion en Araso, kun partopreno de 18 kandidatoj.

4. Kulturo kaj aranĝoj

Nova esperanta traduko de Tinĉjo, *La templo de l' suno* aperis komence de januaro 2013, dank'al sukcesa laboro de Michel Dechy. La tradukinto estas denove Hervé Gonin.

Prelegoj, prelegeturneoj, renkontiĝoj, festoj, ĝemelklubaj aranĝoj

Mikaelo Bronstejn turneis en Francio kaj prelegis kaj koncertis en kaj apud Lille. Estis organizitaj vizitoj kaj renkontiĝoj tiuokaze.

Ni ankaŭ havis la ŝancon bonvenigi Roman Dobrzynski kiu prelegis pri sia libro Bona Espero.

En 2012 okazis pluraj ĝemelklubaj renkontiĝoj : la Dunkirka klubo partoprenis renkontiĝon kun la klubo de Bruĝo en Belgio, kaj klubanoj el Dunkirko vizitis Esperantistojn de la klubo Krefeld-Esperanto (Germanio), (ĝemelita kun Dunkirko). Esperantistoj el Valencieno, renkontis la grupon de Solre-sur- Sambre (36a jara renkontiĝo!), kaj pluraj membroj de LVE partoprenis boatadon kun kortrejkaj amikoj.

La klubanoj de Dunkirko festis la Zamenhofan Feston per vespermanĝo en restoracio, aliaj federacianoj partoprenis Zamenhofajn festojn en Belgio.

Partopreno en kongresoj aŭ aranĝoj landaj, eŭropaj aŭ mondaj

Pluraj federaciaj partoprenis en la UFE kongreso, en PSI (Printempa Semajno Internacia) en Germanio, en la Universala Kongreso en Hanojo (Vjetnamio), en Belgio (Tago de la Flandraj Ardenoj, Zamenhofaj festoj en Belgio). Edmond kaj Arlette Plutniak kaj Thérèse Dequidt instruis dum kvin-semajna studsesio en Hajnano en Ĉinio, la esperanto-insulo.

5. Perspektivoj

Estontaj projektoj aŭ agadoj, deziroj

Nia 2013 **federacia kongreso** okazos en Halluin, la 14an de aprilo. La venonta eŭropa renkontiĝo, kiu denove okazos en Stella-Plage la 16an kaj la 17an de Novembro, estas jam preparata.

Lille 2015, eventuala UK

Xavier Dewidehem, Michel Dechy kaj Julia Hedoux jam akceptis deligitojn de UEA por pridiskuti tiun eblecon. Ni do atendas novaĵojn tiufланke.

Redaktis la sekretariino Katja Boen

3.9. Fédération Espéranto-Poitou-Charentes

(Jarraporto ne ricevita)

3.10. Fédération Espéranto-Provence (Provenco)

1. Membraro

La Esperanto-Provence Federacio havis 62 membrojn je la 31a/12/2012 kaj pli ol 300 nomoj aperas en listo de Esperanto-France sed nur triono pagis sian kotizon.

12 grupoj en la jenaj departementoj kaj urboj:

- 04 – Manosque kaj Villeneuve ;
- 05 – Gap ;
- 06 – Nice, Cannes ;
- 13 – La Ciotat, La Roque d'Anthéron- Miramas, Marseille ; 83 Fréjus-ST Raphaël, Toulon ; 84 Avignon, Orange.

2. Administro

Membrokunveno okazis en Romans la 24an de junio 2012 okaze de la duregiona kongreso en Romans por festi la centjariĝo de la klubo de Romans la 22-an/23-an/24-an de junio 2012.

3. Informado, Komunikado

- La federacio daŭre eldonas sian ĉiutrimonatan bultenon: *Esperanto-Provence*. Unu klubo eldonas propran bultenon.
- La diversaj kluboj partoprenis en multaj neesperantistaj aranĝoj : forumoj de la asocioj

Informado

- **Forumo de Asocioj** la 8an de septembro: budo, klarigoj, mallonga intervjuo ĉe la portempa radio en La Ciotat;
- **Forumo de Asocioj** en Marseille la 9an de septembro;

- **Forumo de Asocioj** en Le Beausset (83);
- **Virina Tago** la 8an de marto : ekspozicio pri la nunaj esperanto-verkistinoj kun fotoj kaj biografioj + dudekminuta parolado pri « Esperanto au féminin », kien Renée Triolle sukcesis enmeti la rolon de esperanto, ĝian gramatikon, la movadon, la ĉefajn verkistojn, la nunan situacion;
- Environnement et partage en La Seyne (83) kun budo dimanĉe la 7an de oktobro, kaj akcepto de lernejoj lunde la 8an;
- Subskribigo de la peticio: malgraŭ nia mala opinio pri la taŭgeco de tiu peticio kompare kun simpla enketo, subskribigo de la peticio sur la dimanĉa bazaro, plurajn matenojn en la stacidomo, printempe dum Mara Salono, dum Festivaloj pri filmoj, pri humuro ktp ebligis paroli pri Esperanto. Renée Triolle zorgas pri regula informo pri la klubo en la gazeto de CIQ, Maison des Associations;
- **Raporto pri Belcodène** – Jeanine Ratouchniak sukcesis organizi ekspozicion dum la monato de februaro. Renée T. kaj Pascal Vilain havis kontakton kun la bibliotekino;
- Pascal prezentis la lingvon en klasĉambro, laborigis la infanojn, kiuj montris grandan entuziasmon;
- En Tulono, F.Noireau regule ĝisdatigas perretajn anoncetojn pri kursoj de la lingvo Esperanto. Ĉiufoje profitas la okazon interveni sur tre diverspecaj forumoj kaj rakonti ke la lingvo estas vivanta kaj alportas riĉan kulturon, kreis sur la retpaĝo *Les Colibris*. En Gap la 27-an de junio : Budo okaze de la Festo de la Pacmovado en agrabla parko de Charance kun partopreno de familio el la Ciotat;
- **Festo de la Solidareco** la 30an de junio en Sainte-Tulle;
- **Tago de Heredaĵo** la 15an de septembro en Manosko – budo kune kun esperantistoj el Aix-en-Provence;
- Sabaton la 13an de oktobro okazis prelego pri Jules Verne en la mediateko de Manosko, far D-ro Paul Chapoy. Li mallonge aludis al esperanto kaj José Grammatiko aldonis informojn rilate la libron *San Carlos*. La Estrino de la mediateko interesiĝis pri tiu libro;
- Foiro **Genépi** – Embrun 8an/9an de septembro, Espéranto-Gap starigis budon kaj kolektis subskribojn de la peticio;
- **Tago de la Patrino Lingvo**: laŭ iniciato de UNESKO, la 21a de februaro estas dediĉita al la patrinaj lingvoj, la lingvo en kiu ĉiu homo strukturigas sian penson kaj malkovras la mondon;
- En La Ciotat, kun la asocio **Le Grand Portique**, kunvenis du-deko da homoj por diversmaniere aŭdigi diversajn lingvojn. Artikolo kun foto aperis en *La Provence* kaj *La Marseillaise*;
- En la lernejo de Saint-Bonnet **prezentado de Esperanto** al kvindek da lernantoj okaze de tiu tago.
- Por festi la 125 jarojn de la lingvo esperanto, en la **ttt-ejo de Esperanto-Provence** aperis 125 proverboj ekde la 23a de marto ĝis la 26a de julio 2012 danke al Pascal Vilain.

5. Instruado kaj ekzamenoj

La diversaj kluboj organizis regulajn dumjarajn kursojn kaj iniciajn staĝojn en klubejoj, lernejoj.

Kursoj: instruado

- **Regula semajna kurso** en CIQ-Fontsainte, dunivela pro manko da novuloj;
- **Intensiva staĝo** en La Ciotat la 1an kaj 2an de oktobro kun... unu staĝano, sed tre lerta juna inĝeniero. Alia intensiva staĝo la 25an kaj 26an de oktobro en Vaucières, internacia vilaĝo;
- Apud Veynes (05) kun 8 diverslandaj junuloj dank' al la perado de Marie-Ho Valli;
- **Semajnfina staĝo** la 24 an kaj 25an de novembro 2012 en le Beausset kun 26 partoprenintoj;
- Kursoj en Manosko la 1an kaj 3an merkredon de la monato;
- Sabaton 17an de marto **tuttaga staĝo** en la Domo de la Asocioj. Dum la jaro 2012 ne okazis kurso en Gap;
- En Saint-Raphaël 7 homoj vizitas la kurson kiu okazas lunde posttagmeze;
- La klubo Fréjus-Saint-Raphaël organizis M.E.S, unu semajnan staĝon ĉe marborbo en Les Issambres, partoprenis multaj eksterlandanoj;
- **Kursoj por komencantoj** en Le Beausset ekde decembro 2012;
- Sabaton la 9an de junio en Avinjono okazis skriba sesio de Ker-ekzamenoj kun Rose-Marie Quintin kaj Renée

Triolle.

6. Kulturo kaj aranĝoj

Prelegvojaĝoj

- **Printempa M.E.S.** en les Issambres bone sukcesis, 93 aliĝintoj el pli ol 10 nacioj;
- Akcepto kaj **publika prelego de Renato Corsetti kaj Anna Lowenstein** pri lingvo-diskriminacio (2 artikoloj kun foto en la lokaj gazetoj) en Marseille kaj La Ciotat. Publika prezentado en Gap kaj Saint-Bonnet (05). Vizitoj al elementa kaj mezgrada lernejoj;
- **Publika prezento** far Alain Rémy la 29an de novembro en **Le Grand Portique** de sia vojaĝo ĉirkaŭ la mondo: 22 000 km per kuŝanta biciklo (du artikoloj kun fotoj en la loka gazetoj). Aliaj plenpaĝaj artikoloj aperis en *La Provence* kaj *La Marseillaise* kiam li estas alveninta.

Biblioteko

- Daŭra disponigo al la klubanoj de libroj kaj gazetoj en Esperanto

Amikaj renkontiĝoj

- Okaze de vizitoj de eksterlandanoj: antaŭkristnaska festo, reĝa kuko;
- Vizito de la urbo estas okazoj praktiki la lingvon;
- Esperanta semajnfino: Mont Ventoux, marto 2012 Klubo de Orange;
- Zamenhofa Festo en Saint-Raphaël kaj en Avinjono;
- Multaj federaciaĵoj partoprenis esperantajn kongresojn aŭ renkontiĝojn (francajn kaj eksterlandanajn) kaj staĝojn. Tri Provencanoj partoprenis en la nacia kongreso en Saint-Aignan de Grand-Lieu en majo kaj 6 Provencanoj partoprenis la U.K.-on en Hanojo.

Venontaj Projektoj

- **Eksteraj rilatoj:** La urba konsilanto pri Eŭropaj Aferoj kaj tiu pri Kulturo neniam respondis, sed ni havas bonajn rilatojn kun tiu pri civitaneco kaj instruado. Same neniel venis reagoj el la instrumedio;
- Artikolo pri partopreno de Renée Triolle ĉe UNESKO aperis en *La Marseillaise* kun foto. Niaj proponoj pri Marseille 2013 ne estis akceptitaj;
- Bonaj kontaktoj ekzistas kun diversaj asocioj;
- **Nova klubo kreata en le Beausset** – 13an de januaro 2013;
- **Ekspozicio** de la 1a ĝis la 9a de februaro 2013;
- Ekspozicio en Manosko de la 18a ĝis la 23a de marto en mediateko.
- **Mediterranea Esperanto-Semajno** en <les Issambres (83) de la 9a de marto ĝis la 16a de marto 2013;
- **Marsejlo 2013:** Jomo kantos en La Ciotat, invitita de Esperanto-La Ciotat marde la 26an de februaro je la 20a30, Théâtre du Golfe.

Raportis Monique Arnaud.

3.11. Fédération Espéranto-Rhône-Alpes (Rodanalpo)

1. Regiona kunordigado

Nia regiono enhavas **200 membrojn**, ĉirkaŭ **70 lernantojn** (60 plenkreskuloj, 10 infanoj) **en 13 kluboj** : Lyon (CERL), Saint-Étienne, Albertville, Espéranto 74 (Annecy), Tarenteza Eo (Moûtiers), Bourg-en-Bresse, Châtillon-sur-Chalaronne, Chambéry, Espéranto 38 kaj Espéranto Grenoble, Valence, Romans.

Ni rimarkas ĝenerale ke grandaj urboj pli facile sukcesas en la varbado por la internacia lingvo. Ĉiusemajne, tri personoj venas de Nyons ĝis Romans por lerni Esperanton kaj ni povas esperi ke postan jaron estos malgranda klubo en Nyons.

La kluboj havas rilatojn inter si : Saint-Étienne partoprenis en konferencoj en Lyon, kaj Romans manĝas ĉiujare kun Valence. Hannes kaj Gisèle Larsson prelegis en Lyon. Monique Arnaud el Provence prelegis kaj instruis en Moûtiers, Moûtiers kaj Albertville renkontiĝas ĉiudumonate por vespera babilado kaj manĝo kaj okazigas kunajn agadojn.

En junio 2012 dum tri tagoj, la **regiona kongreso** estis komuna kongreso kun la provenca regiono en **Romans** okaze de la centa datreveno de la klubo de Romans. Agrabla sed malgranda kongreso : nur 70 ĉeestantoj (antataŭ 70 nur por la rodanalpa regiono dum la aliaj regionaj kongresoj). La kaŭzo eble estis ke la urbestro malfrue ŝanĝis la datojn de la kongreso (li senpage pruntedonis al ni la salonojn) pro la balotoj.

Dum tiu kongreso okazis pluraj prelegoj : René Triolle en la Franca cele al la neesperantista publiko parolis pri grandaj virinoj en la Esperantomovado, Patrick Lagrange parolis kaj gvidis debaton pri nuklea energio, Arno Lagrange prelegis pri Tibor Sekejl ; Okazis atelieroj, aŭkcio profite al la benina asocio **Scioj sen bariloj**, libroservo. Ambaŭ ĝeneralaj asembleoj okazis dimanĉe matene. La teamo de Romans bone zorgis pri tiu kongreso, kies kulmina momento estis la oficiala akcepto en la Urbodomo.

2. Informado kaj komunikado

Rete, oni povas trovi la vivon de la esperanta movado en nia regiono, danke al la federacia retejo kaj la dissendolisto. Oni povas bedaŭri, ke ne ĉiuj asocioj uzas tiujn servojn.

La kluboj partoprenas en asociaj tagoj, forumoj, lokaj festagoj por paroli pri Esperanto (ĉefe **Salon Primevère** en Lyon). Por helpi la komunikadon dum la salonoj, la federacio disponigas tri rulpanelojn, kiuj restadas en Saint-Étienne.

Grenoble laboras en lernejo, kaj Moûtiers en infancentro.

La kluboj estas informitaj de la landaj kampanjoj kaj la membroj subskribas kaj subskribigas la peticiojn.

En Bourg-en-Bresse Jean-Louis Gayet delonge partoprenas en loka radio elsendo ĉiujn du semajnojn.

3. Instruado kaj ekzamenoj

Preskaŭ ĉiuj kluboj havas unu aŭ du nivelajn kursojn por ĉirkaŭ **70** malnovaj aŭ novaj lernantoj.

Tiujare, okazis **tri regionaj unutagaj staĝoj** por progresantoj de sufiĉe bona nivelo (inter dua kaj tria grado) en Albertville, Lyon kaj Lajoux (Jura).

La 9an de junio **37 esperantistoj sukcese trapasis la ker-ekzamenojn** (el 39) en Lyon aŭ en Grenoble okaze de la tutmonda ker-ekzamoto. Tio estas en Francio kaj eĉ mondscale, granda sukceso.

4. Kulturo kaj aranĝoj

Turneoj

- **Alexandre Melnikov** prelegis en Lyon
- **Renato Corsetti kaj Anna Löwenstein** prelegis en Lyon (20 esperantistoj, 10 ne-esperantistoj) kaj en Grenoble – pere de la asocio « Les amis du monde diplomatique ». Ili disdonis la KER-diplomojn en Bourg-en-Bresse, Fontaine (ĉirkaŭurbo de Grenoble) kie Anna Löwenstein instruis en lernejo.
- La **CERL** de Lyon, tiun jaron, havas katalunan kaj ĉeĥan membrojn, akceptis Nepalanon. Koreanina profesorino venis en Bourg kun 5 kolegoj kaj **Esperanto 38** ricevis 2 danojn. Moûtiers kaj Albertville akceptis Beninanon.

- Philippe Pellicier (Moûtiers), kun Mireille Grosjean (Svisio), vizitis Beninon por instrui la lingvon kadre de la Esperanto-semajno en Kotonuo organizita de **Scioj sen bariloj**. Kadre de tiu semajno okazis « unua kontakto-semajno » en kiu partoprenis trideko da homoj eklernantaj Esperanton. Aliaj homoj kaj infanoj partoprenis dum la semajno en kursoj diversgradaj. Ĉiuj trapasis ekzamenojn fine de la semajno.
- Pierre Grollemund (Saint-Étienne) havas rilatojn kun Esperantistoj de Rutĉuru (en Nord-Kivu en DRKongo) kiuj loĝas en rifuĝejon apud la urbo Goma, kaj provas helpi ilin.

Aliaj rilatoj

- Bourg-en-Bresse organizis skajpan konversacion al eksterlando, kaj pripensas kun amerikano al virtuala Esperanta universitato.
- Pluraj esperantistoj partoprenis en kongresoj

4. Jarraportoj de la fakaj asocioj

4.1. Espéranto-Jeunes (JEFO)

Nova Estraro

En septembro elektiĝis nova estraro. Ĝi konsistas el:

- Alexandre Raymond : Prezidanto;
- Sébastien Denux : Vicprezidanto;
- David Hauser : Sekretario;
- Quentin Weber-Seban : Kasisto kaj reprezentanto al UFE;
- Laetitia Bert : TEJO-Komitatano A;
- Julia Hédoux : Reprezentanto de UFE.

Ni plie bonvenas Meva Cuenot kaj Adeline Reynaud kiel komitatanoj.

Informado kaj komunikado

Kunlabore kun UFE, JEFO daŭrigis sian sukcesan eldonadon da kalendaretoj. Tiuj kalendaretoj ankaŭ enhavas informojn pri Esperanto kaj unu bildon. Ili estas senpage disdonitaj dum grandaj kunvenoj – Fête de l'Huma, Salon des Langues, ekzemple – kaj same senpage senditaj al mendantoj. Eblas donaci monon al JEFO pro tiuj kalendaretoj – tio helpas nin daŭrigi tiun gravan iniciaton.

Instruado kaj ekzamenoj

JEFO transdonis la senpagajn retkursojn al UFE, kiu efektive povos pli bone zorgi ilin. Ni dankas al ĉiuj kiuj helpis sukcesisgi tiujn kursojn.

Kulturo kaj aranĝoj

La komitatanoj denove partoprenis la gravajn jarajn aranĝojn. Tiu ebligas reprezentadon de JEFO ene de la movado – ni ekzemple videblis kiel trinkejstroj dum JES en Gdansk – kaj varbadon da novaj francaj membroj.

Ni ankaŭ decidis proponi al membroj partopreni malmultekoste niajn trajnkaravanojn. Iniciatitaj de Alekĉjo, trajnaj karavanoj estas agrablaj antaŭ- kaj postkongresoj. Por la venontaj someraj renkontiĝoj, eblos kiel JEFO-membro vojaĝi senpage per ili.

Ni ankaŭ subskribis kontrakton kun aliaj eŭropaj junularaj organizoj por « interŝanĝi » membrojn dum renkontiĝoj. Post IJF en Italio, ni realigos tiun kun IJS en Hungario, kaj ni plu laboras kun aliaj organizoj. Tiel JEFO-membroj povos senpage partopreni internacian renkontiĝon. Ni publikigos baldaŭ pli da detaloj.

JEFO-renkontiĝo denove estis granda sukceso. Ĉi jare, FESTO okazis aŭguste en la montara vilaĝo Métabief kaj kunigis pli ol 100 partoprenantojn. Ankaŭ la organizteamo estis internacia, kun ĉeesto de Roĉjo Huurman. Ni dankas Flo Martorell, kiu ofertis kiel ĉiujare riĉan kulturen programon, de Zhou-Mack Mafuila al Dolchamar tra Jonny M kaj lokaj artistoj kiel Billy Fumey.

Post tiu « lasta FESTO antaŭ fino de la mondo » planita por la 21a de decembro 2012, ni kompreneble devas organizi la « unuan FESTO-n post fino de la mondo » ! Ĝi okazos en aŭgusto en iu loko riĉa je Esperanto-historio: Amikejo, en Belgio! Pli da informoj kaj aliĝilo troveblas ĉe festo.jefo.fr

Resumo

JEFO proponas gravajn aktivadojn, inter alie multajn senpagajn. Tio havas koston, ĝis nun limigita, sed kiu devigas nin trovi longtempajn solvojn. Plie, pro manko da volontuloj kaj ŝanĝo en la strukturo de la membroj, ni ne plu povas garantii tradician aktivecon.

Ni konscias pri la multaj defioj antaŭ kiuj ni staras, sed vidas tiun jaron kiel okazo realigi la multajn eblecojn de Esperanto-aktivo. Tio jam komencis, kun la trajnaj karavanoj kaj interŝanĝoj inter eŭropaj renkontiĝoj. Ni dum la jaro daŭrigos tion reaktivadon.

4.2. Groupe des enseignants espérantophones (GEE)

Laŭ la loko niaj gekolegoj agis plej bone kiel eble...

En Bretonio, instruado de esperanto en 2012

- En **Saint-Brieuc**, informado pri Esperanto en la liceo Ernest Renan kaj en la Universitato, akcepto de la brazila esperantista liceano Igor Ferreira, de Bona Espero, dum unu jaro, en esperantistaj familioj de la asocio Armor-Esperanto, li studis en liceo de Saint-Brieuc;
- En **Lannion**, informado pri esperanto en la inĝeniero-altlernejo ENSSAT kaj venonta kreado de kurso;
- En **Trédez** 3 infanoj lernas Esperanton;
- En **Dinan**, la eksterlandaj gejunuloj, kiuj praktikas « woofing » en asocio « la eta ĝardeno de la lernejoj » ĉiujfoje vizitas la esperanto-kurson;
- En **Pluezek**, interveno en la baza lernejo (CM1 kaj CM2) kun espero de venonta kurso en februaro 2013.
- En la pluezekaj 2012-internaciaj renkontiĝoj, 7 diversgradaj esperanto-kursoj;
- En Landerneau, partoprenas la kurson juna liceano;
- En **Pluguffan** (apud Quimper), budo en la multlingva **Salon multilingue du Livre Jeunesse** (Salono de la Junulara Libro);
- En **Rennes**, 6 gejunuloj, plejparte studentoj, komencis teatro-aktivaĵon.

Raportis Josette Ducloyer

En Bondy (93a departemento) – Ateliero *Junaj civitanoj sen landlimoj*

- En **Bondy** (apud Parizo), ekzistas Esperanto-ateliero en la bazlernejo Salengro ekde 1996 (kiam mia filo Nikolao estis 7-jaraĝa kaj lernis tie). Ĝi funkcias unu fojon semajne, de la 17a ĝis la 18a. En septembro, ĉiuj lernantoj ricevas informilon kun aliĝilo (presitaj en la urbodomo), kiun ili « principe » transdonu al la gepatroj. Por aliĝi, necesas pagi etan kotizon.
- En 2010, la ateliero ricevis novan nomon *Jeunes Citoyens Sans Frontières*, laŭ samnoma interlerneja reto fondita preskaŭ hazarde de deko da Eesperanto instruist/antoj. De tiam, la nombro de Esperanto-lernantoj signife kreskis (por informo, en 2008 = 3, en 2009 = 4, en 2010 = 6, en 2011 = 8 kaj en 2012 = 10).
- Al tiuj infanoj, mi provas ĉiujare proponi E-aranĝon kaj tiucele starigis la renkontiĝon FRINGOJ en 2006. Okaze de la *Festa Renkonto Internacia de GeknabOJ*, dum unu semajno kunvivas en Grezilion', grupetoj de diversaj landoj akompanataj de siaj instruistoj, por prepari spektaklon prezentotan publike.
- Mi profitas per tiu rubriko por diri ke restas liberaj lokoj por *FRINGOJ 2013*. Dank' al financa subteno de multaj francaj samideanoj kaj lokaj asocioj, plus grava financa helpo de UEA, ni profitos bonegajn kondiĉojn kaj proponas tre favorajn prezojn.

Raportis Elizabet Barbay

En Lille, jaro 2012

Ĉiusemajnaj Kursoj

- **Universitato Lille III** : ĉiun mardon de la 18h15 ĝis la 19h45 por komencantoj (ĉirkaŭ 5 lernantoj), kaj dufoje monate lunde je la sama horo por praktikantoj (ĉirkaŭ 3 lernantoj) (interkrampe aperas la instruanto : Michel Dechy);
- Kvartala Domo en la centro de **Lille** : ĉiun mardon por komencantoj (ĉirkaŭ 4 lernantoj), je la sama horo (Katja Boe);
- **Bersée** : ĉiun lundon je la sama horo, por komencintoj ĉar ĉiuj eklernis lastan jaron, do gratulojn al Claude kies 7 lernantoj daŭre lernas ĉi jare, (Claude Longue-Épée).

Prelegoj kaj prezentado de la lingvo Eo

- Kadre de « kulturaj semajnoj », prezentado de la lingvo en Kolegio Molière en Villeneuve d'Ascq fine de la lernojaro kaj en la kolegio St Exupéry en Hellesmes la 9an kaj la 11an de majo. La kvin klasoj de la unua nivelo (6a) ricevos « bonan » informon pri Eo. (M.D.).
- Ĉiujare la elementaj lernejoj proksime al mia hejmo (Anatole France kaj Picasso) invitas min. Mi proponas 3 seancojn po 1h30 (Prezentado de Esperanto, kurso pri matematiko en Esperanto kaj fine japana Sorobano ankoraŭ en Esperanto). Kelkfoje
- Aliaj lernejoj ankaŭ invitas min.
- La 16an de aprilo en Liceo Gondecourt, Eo dum 1 horo antaŭ 3 diversaj klasoj (arbituriento).
- La 15an de novembro, dum la tuta mateno, en la klaso CM2 de Sino Courtin, de la lernejo Paul-Durot en Seclin, kie ankaŭ instruas mia filino Izabel.
- Budoj okazis dum **Festivalo de la Lingvoj** en la Universitato Lille III : la 28an kaj la 29an de septembro.

Se Michel Dechy agis diverscele, ankaŭ li kun Hervé Gonin prizorgis la tradukon de la bildstrio *Tinĉjo La Templo de l'Suno*. Raportis Michel Dechy.

En Châteauroux

Raportis Maryvonne Houvriez por la jaro 2012 :

- Estis kursoj aŭ kluboj por infanoj en **La Domo de la Infanaj Rajtoj** de Châteauroux kaj en la mezlernejo Romain Rolland de Déols.
- La infanoj kaj la gejunuloj de la du jam menciitaj lokoj kaj tiuj de **Accueil de Loisirs** de la Maison de Quartier EST Châteauroux partoprenis en desegnaĝa konkurso organizita de la asocio de Saint-Nazaire. Ili ĉiuj partoprenis kun aliaj asocioj en agado pri ne perforto farante paperajn florojn por la Domo de Ana Frank en Amsterdamo kaj skribante pacajn mesaĝojn sur la paperaj floroj.

Kursoj en La Ciotat

R. Triolle raportis pri kursoj – 2011-2012 ĉe CIQ-Fontaine.

La kvartala bulteno (4000 ekzempleroj) regule raportas pri la ebleco lerni Esperanton:

- Ne estas lernanto en la unua nivelo;
- Duagrada : funkcias konversacia kurso merkrede de la 17a ĝis la 18an, poste kurso de la 18a ĝis la 19a (laŭ *Paŝoj al Plena posedo*);
- Triagrada funkcias same merkrede je la 19a surbaze de fotokopioj pri diversaj tekstoj eltiritaj de gazetoj aŭ romanoj;
- Neniu kandidato por la F.E.I. ekzamenoj.

Kursoj en Marseille

Marde che CIRA (Centre International de Recherches sur l'Anarchie)

- Unuagrada kun unu lernanto, kiu malaperos pro malsaniĝo (sed restas en kontakto);
- Triagrada kun 3 bonaj praktikantoj, ĉefe surbaze de artikoloj el *Monato*. Krome estis organizitaj intensivaj staĝoj en La Ciotat kun tri lernantoj;
- Neniu kontaktebleco kun la lernejoj kaj instruistoj sed regula informado tra la bibliotekistoj de la 3 kolegioj, 2 liceoj kaj Universitata Instituto.

GEE-2012

M. Arnaud raportis por GEE-2012

- Dum 3 semajnoj mi estis en kuracurbo en Savojo, Moûtiers. Tie mi instruis al la lokaj grupanoj kaj mi prelegis, la temo estis : « kiujn lingvojn ni lernu ekde la komenco de la XXla jarcento ? ».
- Por danki lernejestron kiu pruntedonis klasĉambron okaze de tutmonda KER-skribsesio en Grenoble-Fontaine, mi plurfoje vizitis la mezgradan lernejon Jules-Vallès por prezenti kaj ekinstrui esperanton al lernantoj.
- Aŭtune mi volontulis por instrui dum 6 semajnoj en lernejoj en Mazara del Vallo, Sicilio.
- Ni iom bedaŭras ke aliaj geinstruistoj ne raportis aliloken cele al pli bona videbleco de la instruado en la lernejoj.

Kolektis la raportojn M. Arnaud kaj Jo Catil.

4.3. Franca Katolika Esperanto-Asocio (FKEA)

Prezidanto (Bruno Masala) tute malaperinte, ankaŭ F.K.E.A. fantomiĝis...

Havante du horojn rezervitajn en Seto, areto da membroj decidis, laŭ la asocia statuto, skribi al la eksa prezidanto (elektita statuto por UNU jaro renovigebla) leteron subskribitan de tri membroj de la Komitato.

Neniu respondo.

Do, ni sendis al ĉiuj membroj invitolon al Ĝenerala Asembleo Eksterordinara en Stella-plage, kie do okazis meso en

Esperanto en la belega kapeleto de la ministoj, dum la renkontiĝo organizita de Arlette Plutniak.

Surloke aŭ letere, membroj decidis « resurekti » F.K.E.A.

Nova prezidanto : Victor Simonnet (filo de François), juna, denaska de du generacioj. Frato Benoît Ente, dominikano, nia « conseiller ecclésiastique ». Anne-Marie Chaney, sekretariino. Daniel Chevalier, kasisto (kiu esperas anstataŭanton!). Marie-Thérèse Marin, kiu reprezentas F.K.E.A. ĉe Esperanto-France (kiam ne eblas, Anne-Marie Chaney). Aliaj membroj : Michèle Abada-Simon, René Ballaguy, Dominique Baron, Sylviane Lafargue, Vincent Peingnez.

Ni luis budon, kvaran fojon, en **Semaines Sociales de France**, kun relative bonaj kontaktoj (el kiuj unu sekvis staĝon en Ĉerizejo fine de januaro).

Nun en 2012 komenciĝas novaj projektoj. Interaliaj, partopreni la interesezan ideon de seminario fine de junio en Greziljono. La Ĝenerala Asembleo okazos kun tiu de Espéranto-France.

Kompreneble, BONVENON al ĉiuj !

4.4. Fédération espérantiste du travail (FET)

Luado de la surfaco (25 m²): 935 €

Luado, transportado kaj muntado de tendo: 702,65 €

Elektro: 192 €

Fajroestingilo: 37 €

Necesejkabino: 319 €

Sume: 2185,65 €

Antaŭviditaj enspezoj:

Subvencio de Espéranto-France: 750 €

Subvencio de la Pariza Grupo de SAT-Amikaro: 750 €

Suvenio de JEFO: 200 €

Kontribuo de FET (ebligita de escepta donaco): 465,65 €

Sume: 2185,65 €

Por 2012 ni rezignis pri pretigado de krespoj, ĉar la sperto de la lastaj jaroj montris, ke tio ne plu helpas ekvilibrigi la buĝeton, kaj nur komplikigas la organizadon. La nombro de vendistoj multiĝis dum la lastaj jaroj, kaj nia budo ne situas en loko, kie homoj venas amase por aĉeti nutraĵojn. Kroma avantaĝo estas, ke tiel estos pli da spaco por montri flugfoliojn pri la parizregionaj kursoj, kaj ankaŭ pli da disponeblaj deĵorantoj por respondi al informpetoj kaj kolekti adresojn de interesiĝantoj.

Kvankam tio povas aspekti iom « lukseme », ni decidis kiel pasintjare lui necesejan kabinon ĉar ni ricevis multajn pozitivajn komentojn pri ĝia bonveneco, ofte de virinaj deĵorantoj, sed ne nur.

Unuafoje ni luis estigilon, ĉar la privatulo, de kiu ni ĝis nun prunteprenis ĝin, opinias nun ke tio estas tro riska.

Kiel vi povas konstati, la tuta kosto de la budo atingas nun la sumon de 2185,65 eŭroj

Komparocelu, la kostoj por kvartaga budo en la pariza salono Expolangues estas 4000 eŭroj laŭ la katalogo (praktike estis pagitaj 2300 ĝis 2008).

Organiza bilanco: transportado, muntado, deĵorado, disponebla materialo, aktivaĵoj proponitaj al la publiko

Mankegis kalendaroj de JEFO. La informiloj pri kursoj datumis de 2011. Estis afiŝoj pri filmokunveno. Aldoni ion en la

letero pri tio al Espéranto-France. Vito ne certe povos helpi en la transporto.

Mankis *L'Homme qui a défié Babel* kaj aliaj malmultekostaj franclingvaj broŝuroj. Ankaŭ mankis franclingva gazeto disdonebla, kun enhavo konforma al la publika, povanta ekzemple enhavi la gazet-artikolo pri la SAT-Kongreso. Ĉu speciala eldono de Esperanto-aktiv' ? Aldonaj kursoj laŭ mendo de Bertrand kaj Ŝtonĉjo, masaĝoj.

Perspektivoj por 2013: amplekso de la budo, kia materialo, kiaj aktivaĵoj. Pli specife : kiel plu disvolvi la masaĝadon, kaj ĉu proponi vendadon de fruktoj aŭ legombakaĵoj por ekvilibrigi la bilancon?

Pri masaĝado, ne nepre necesas plia spaco sed ja prefere kurteno.

Pro tio ke ne plu estas la petskriba kampanjo, leviĝas demando pri ekvilibro de la informomaterialo kaj de la financa partopreno de la diversaj asocioj. Esplorinde pri pomoj el AMAP-produktisto ?